

LA PSIKOLOGIO DE LA MURDO (2-a daŭrigo)

Par. 3. - La krizo.

La recenta kaj la malnovaj memoj nun akre konfliktas: la problemoj estas konscia. Tiu psika situacio kreas ankaŭ korespondan fizikan staton, nome malgrasigon, senapetitecon, nervecon, emociajn paroksismojn k.t.p., dependajn de la internaj diskutoj, de la sento de ĝeno, de la sandorneco. Krome la kriza stato maskas daŭran superemocieblon kiu forte efikas sur la psikon.

Kaj tiam ofte okazas bruska ŝanĝo: cedo - kun reala morala agonio - de la malnova memo, multa pli ol venko de la recenta. Tamen, la atingo de la krizo ne ĉiam garantias identan rezulton: iam la malnova kerno rekolektas siajn fortojn kaj regajnas la perditan termon; en aliaj kazoj, diversaj alternativoj proksimiĝas al la definitiva solvo, kaj, fine, la krizo kalkfoje neniam finiĝas: la indiĝeno ĉiam uzas ekvivalentojn, li ade ruzas kaj dupas sin mem kaj la aliajn.

La krizo egalas la decidan momenton en ago banala. La subjekto paŝas en nekonataĵon, kaj alvokas la emociion kiu donas pli da forto, pli da kuraĝo, pli da aŭdaco, tiel ke, en la lasta minuto, kiam la por-kaj kontraŭ-pensoj lastafoje spitas sin, la emocio prezidas la agadon. La vera fino de la krizo estas la plenumo de la decido, ĉar, se aperu alia stato anstataŭis la pli fruan, fakte, en la animo de la neofito, la transformo ne estas tiel radikala; nun la laboro komencas por plene efektiviĝi la signifon de la gesto. Tial, nur serioza fortikiĝo de la nova personeco ekskludas reiron al la antaŭa; la longeco, la malfacileco de la diskutoj, hezitoj, antitezoj antaŭ la konvertiĝo evidentigas ĝiajn rezistopovon kaj profundajn radikojn tiel ke akceptebla de la regreso kaj tiam, ĝia verŝajneco, ne niĝas.

Dro De Creeff tie akcente konkludas ke unu ago ne priskribas la homon, ke ĝi esprimas nur parton de la personeco; efektive, la ago estas absoluta, ĝi estas aŭ ne estas, sed la interna teniĝo kiu direktas tiujn absolutajn agojn ofte estas nur ne-eblo ne plenumi ilin. Do, se ĉiu devas respondi pri siaj liberaj faroj, oni ne rajtas konsideri ĉe individuo la nuran sintenon kiu enhavas iu manifesto de lia socia vivo; tiam necesas scii en kiu grado tiu ago reprezentas la veran aspekton de la psiko kiu plenumis ĝin.

La diversaj dividoj de la proceso alivorte egalas preparon, adaptiĝon kaj fine akcepton de la ideo kiu realiĝis nur ĉar ĝi povis sen proteste iradi la personecon; ni jam notis ke, dum la evoluo, la subjekto ne rigardas sin, ke ĉiu okazaĵo ekstera je la personeco iĝas grava, tiel ke relative eblos estru la fenomenon: ni antaŭsentas ke, por la murdo, tiuj rimarkoj estas speciala atentindaĵ.

IV. - La skeno de la normala murdo.

Ni komprenas ke la kriminala romano kaj la okazo en asizejo ne redonas la animon de murdanto. Iliaj kutimaj, - tro simplaj - motivoj (venĝo, ĵaluzo, sinamo, la pasioj ĝenerale) ja ion priskribas - ili certe intervenas - sed ili ne penetras la internon de la individuo, neniel taksas la gradon de la reala konsento kaj fakte neglektas ke la ago rivelas, krom la sentojn de la krimulo, ankaŭ tutan periodon el lia pasinta vivo kaj aŭguras pri lia futuro.

La tezo estas de jena: "Se manifeste ekzistas homoj kiuj decidas pri la vivo kaj la morto de siaj proksimuloj, ne konsiderante tion pli peza ol simplan profesion decidon, por la plimulto la krino estas la rezultato de interna periodo de doloroj kaj dramoj, la rezultato de mensaj sintenoj kompleksaj, repuŝitaj (1) kaj torditaj (2), kiuj fine kaj malgraŭ ĉio esprimiĝas en momenton de cedo, en eraron" (3).

La varia gravo de la heredeco, de la medio, de la cirkonstancoj (kauzoj de la krino) solviĝas en afekciajn psikajn statojn, en intelektajn konfliktojn, en momenton de interna vivo, kiu povas esti

reduktate al la kutinaj normalaj procesoj. La krino estas ago grava, ago homa: ĝi estu traktata kiel homa morala ago, kaj se la scienco (ekstera observado, antropologiaj kaj kurac-psikiatriaĵoj) devas kompletigi la psikologian studon, ĉefe estas sci kiel la kulpulo vidas, juĝas kaj taksas sin, kaj precipe por terapio kriminologia.

La elekto de stato de alian liveras diferencon sistemon, kiu permesas kompari, sekvi kaj trakti ĉiujn la genezon kaj la evoluon de la eraro; ĉefe, ĝi kaptas la patologiajn kazojn, kiuj ne estas "apartaj", tute fremdaj al la komunaj konceptoj kaj al la homa animo (nenoru la instinktan tipon de Lombroso).

Par. 2. - Unua etapo: ĉirkaŭ la konsento senefika

Periodo pli subkonscia ol konscia, substre-

ĉata de multaj nekonsciaj elementoj (4).

Konkrete individuo (kun determinitaj ago, temperamento, raso, eduko, moraleco, intelekto) troviĝas en tiaj situacio (ofte pro sia kulpo), loko kaj medio de la vivo de alia individuo vekas en li konsiderojn pri vico malapere tiel ke li fane diros: "Donde ke tiu akcidento ne okazis al li!" aŭ ion analoga.

Tiu pripenso apertas la eraron de la konsento senefika kaj rezultas staton jam subtere ekzistantan; ĝi estas farata okazo de ravo, sugesto de akcidento ktp. kaj povas aŭtomate kaŭzi la konsenton senefikan, kiam en la subkonscio jam troviĝis sufiĉaj elementoj.

Inter gisantoj, ofte estas la legado de mortanenco, raporto pri trafik-akcidento, aŭdo de sonorilo k.t.p., kiuj manifestos tiun penson kaj rivelos al ili kiel statas. Se la intereso estas sola, li esprimos la ideon per si mem: legado, konverso, filmo, spito subite estigos ĝin el nekonsciaj ĝernoj.

Tiam la sentmaniero, la superemocionblo, la super- aŭ ne-senteno, la amocia malekvilibro unuflanke, la antaŭa konduto, la ago, la medio aliflanke ege intervenos; la reago ankaŭ dependos de la propraj temperamento kaj moraleco kaj jam en ĉi stadio la granda plinulto el la homortigaj pensoj peras. La konscienco-ekzameno, la kutina lojaleco je si mem, la morala vivo ankaŭ ludas rolon kaj la efiko de vortludoj, karikaturoj, popularaj kantoj ne estas neglektinda. Ĉiu konsas tiujn proverbojn, ŝercojn ion pezajn pri la virino, la edz(in)o, la bopatrino, kiuj kruda sed anuza oligas "morto-sonorojn"; ion ne atendite ilia influo en la sociaj rilatoj ŝajnas antaŭgarda. Efektive, por la miloj kiujn la vivo de iu persono ĝenas kaj en kiuj mortiga ideo enorgas, la aŭdo de tiuj spritaĵoj sendube igas la malbonan deziron klara; tamen tiuj cinikaj refrenoj kaj popoldiroj bremsas, tiel ke ilia signifo estas interpretenda sekve: "Mia situacio estas tute komuna, neniu pensas pri vera efektivigo, estas nur blago... rigardante la enhavon de la spritaĵo reala, mi tute malsimilas la aliajn!" Tiu rezono, praktike nekonscia, apogante sur la morala reago de la subjekto, sur ilia persona malaprobo rezignigas la projekton kaj tial decido ŝajnas al li tute konforma al la homa saĝo. Tiel, ankaŭ tiuj vivaj formoj de iu natura moralo - vortludoj k.s. - estas socia bariero kiu retenas multajn homortigajn pensojn (5).

Par. 3. - Dua etapo: ĉirkaŭ la konsento formulita.

La subkonscia evoluo ne ĉesis, sed grandparte ĝi konscie disvolviĝas.

Tiu devas malaperi kaj "mi helpas tiun forigon". La subjekto konsas la precizan proponon, sed zorgas ne frunte konsideri ĝin, aŭ esperas eviti rektan enunxon. La ideo pli kaj pli konturniĝas; en la animo, por- kaj kontraŭ-voj karakterizas la progreson, estas antaŭentroj kaj regresoj. La subjektoj troviĝas la malpravojn de la viktimo, nobligas la motivojn de lia forigo. La danĝeroj, la baroj, la degenero, la malsato nutras la internan reziston. Lia pasinteco, palo el la socio estas riskataj...

En tiu momento la legiĝoj, la frekvento de iu medio, iuj tute malgravaj cirkonstancoj ege efikas sur la konsciencon: datalo povas kaŭzi aŭ neluagoblan salton antaŭen aŭ fugon senrevenan (vidu par. 4. - La krinonaskaj cirkonstancoj). En ĉi periodo hazarda incidento, diskuto, ebrio iu bruske manifestas la ideon: tiam la preparo estas nekompeta, la plenumo aĉa, ĉe la elementaj antaŭzorgoj ne atentitaj.

Ĉi tiu observas homortigojn kiuj realigas kvankam la kulpulo neniam kurdis rigardi sin, kaj plue neniam konsideris ke ja li plenumas la agon al kiu

li tamen sentas sin kondukata (Preterlasaj murdoj au certaj "bruskaj" murdoj)

& & & & & (K.M. (ĉaŭrigota))

Notoj: (1) verdringen, refouler; oni eble povas uzi re-fuli, etimologie simila al la franca: refouler.

(2) france: retors; lau la Plena Vortaro la dua senco de tordi = misformi au difekti tordante - kaj jen certe la tiea figura senco.

(3) La psikologie de l'assassinat, loc. cit. p. 214.

(4) La nekonscia vivo ne estas pristudata: ĝi situas sur alia plano, nome de la studo de la fenomeno kiel fenomeno, kaj ne plu, kiel tie, kia ĝi estas vidata de la konscienco de la subjekto.

(5) Iro De Greeff donas diversajn ekzemplojn; mi elektis la kanton "Le Vieux Mari" (ĉerpita el Max Wuchon, Chants populaires de Franche-Comté, Lib. Sandon, 1878, p. 148) kiun mi ne tradukis, kaj ĉu esperantigitajn apri-taĵojn (?): Le Vieux Mari.

Mon père n'a donné à choisir
D'un vieux ou d'un jeune mari.
Tra la la la
Pour rire...

Tra la la la
Pour rire...

J'écouterais le vieux aussi,
Pour vendre sa peau à Paris.

Devinez-vous lequel j'ai pris ?
Le jeune laissé, le vieux j'ai pris.
Tra la la la
Pour rire...

Tra la la la
Pour rire...

Puis je reviendrais au pays
Où j'épouserai le jeune aussi.

Je voudrais qu'il vînt un édit
D'écortcher tous ces vieux maris.

Tra la la la
Pour rire...

-- Du virinoj babilas: - Vi portas florojn sur la toubon de via edzo ?
Estus la plej granda feliĉo de mia vivo.

-- Kvincent frk. por la operacio de mia edzino...? Mi bezonus nur ducent por ŝia enterigo.

Estas senduba cinikajoj, sed la cinikeco estas luda, gluza, kaj neniu rigardas ĝin serioza; ĝi nerakte moraligas (la kino kontraŭe enhavas saman cinikecon sed kiel realan, naturalhaveblan elementon: amasa demoraligo).

888888888888888888888888888888

SKRIBTALENTOJ DE NIAJ GEJELBROJ :

PROVO DE TRADUKO

SAGESSE

SAGECO

de Paul Verlaine

Le ciel est pardessus le toit
si bleu, si calme.
Un arbre pardessus le toit
berce sa palme.
La cloche dans le ciel qu'on voit
doucement tinte.
Un oiseau sur l'arbre qu'on voit
chante sa plainte.

Super tegment' la ĉiel'
blua kvietas.
Super tegmento la arb'
palmon vipetas.
La sonoril' en l'aer'
dolĉe tintadas.
Birdo sur l'arb' kiu jen
plendon kantadas.

Mon Dieu, non Dieu la vie est là
simple et tranquille.
Cette paisible rumeur là
vient de la ville.
Qu'as tu fait, o toi que voilà
pleurant sans cesse ?
Dis qu'as tu fait, toi que voilà
de ta jeunesse ?

Ho mia Dio, la viv'
simple serenas.
Tiu pacema murmur'
l'urbon elvenas.
Kion vi faris, ho vi
jen ploradanta ?
Kion vi faris en ag'
juna, ardanta ?

(trad.: Drs. F. Roose)

=====

OMI METIS MAKULON EN MIAW KALKULON - (dat as een streep door myn rekening)
ROST ALKUTILIGO DOLORAS DISIGO - (Scheiden doet lijden)

FOR SCIVOLENTULOJ : - GANGSTER-BANDITISMO EN USONO KAJ ĜIA BATALO KONTRAŬ LA G-LEŬ-POLICANARO.

Kvankam, en miaj lastaj du paroladoj, mi priparolis tiun ĉi temon, tamen, je demando de multaj, mi decidis skribi resuman artikolon pri ĝi, speciale por ke la redaktintoj rememoru la plej interesajn faktojn kaj la neĝoĉestitojn ankau ion prisciiĝu.

& & &

I.- La plej gravaj kaŭzoj de la gangster-banditisma skizisto.

Usono ne estas eŭropa lando; ĝi apartenas al la "Nova Mondo" kaj tie okazas aferoj, kiujn ni ne vidas en nia terparto: unu el tiuj estas la gangster-banditismo.

Ne dubu, karaj gelegantoj, ke Usono estas kiel eŭropa ŝtato, havanta fortan aŭtoritaton, tradicion, unuspecan genton, ne. Usono estas federacio, konsistanta el 48 "States" (ŝtatetoj), kiuj ĉiuj havas propran aŭtoritaton kaj nur ete dependas de federacia administrado en Washington. Loĝas tie ĉirkaŭe 40 milionoj da homoj el ĉiuspecaj gentoj; Usono estis vera "meltingpot" (fandvazo) en kiu ĉiuj ekzistantaj gentoj intermiksiĝis. Emigrantoj el ĉiuj kontinentoj alvenis. Usono estis ja la lando de promaso - kaj kompreneble friponoj kaj filhomoj, speciale Italianoj, Balkanlandanoj kaj Irlandanoj, ankaŭ riskis sian ŝancon.

La juro diferencis de ŝtateto al ŝtateto: ia direkto ekzemple, kiam oni en LOUISIANA punis per ĝismorta malliberejppuno, nur ricevis en DELAWARE 100-dolaran nonpunon. Kompreneble, kiu faris en iu ŝtateto fiagon, tie severe punitan, forkuris al alia ŝtateto, kaj en tiu povis sendangera ĝui de sia rabajo. Ĉu ne estis polico? oni povas demandi al si nen. Jes, estis ŝtateta kaj federacia polico. Ŝtateta havis rajton agi en sia ŝtateto kaj ne en alia Federacia havis rajton agi en ĉiuj ŝtatetoj, sed nur por kelkaj krimoj, speciale rabo de federacia banko, "kidnapping" (honrabo), serĉo de alilandaj spionoj, ŝtalo de aŭtomobilo, per kiu la ŝtelisto veturis de iu ŝtateto al alia. La friponoj do evitis fari tiujn rabojn, kiuj permesis federacipolican intervenon.

Skandalega kaj ege krimhelpa estis la korupto, speciale de politikistoj kaj juristoj. La usona popolo elektis siajn urbestrojn, ĵuĝistojn, "sherrifs" (policeestrojn) kaj aliajn funkciulojn. Prezentante sian kandidaton por la ofico de adjunct-attorney, oni bezonis 10.000 dolarojn, kiuj servus al elekta propagando (ĉar propagando trege influas la usonpopolan opinion). Estis 3 elektoj: au la kandidatulo estis ege riĉa kaj 10.000 dolaroj al li estis nenio, au li estis sufiĉe riĉa, sed tamen tiu ĉi sumo estis granda parto de lia havo; lia unua penso estis: "kiel ni regajnos tiun sumon post nia elekto?" Se tiu kandidatulo estis morala ne altstara, la gangster-bandoj lin facile koruptis, ĉar ili donis grandajn sumojn; au tria elekto: li estis malriĉa kaj simpatia al la banditoj, tiam tiuj ĉi donis al li la necesan monon kaj per teruro kaj naŝinpafiloj ricevis la voĉdonojn. Kompreneble, ian iliajn anoj en la publikaj oficoj, la "gangsters" povis fari kion ili deziris.

Tiel oni povas kompreni ke en Chicago en 1935 85% de la administrandaj oficoj estis koruptitaj. Do la krimuloj povis senpene fari siajn "laborojn"; se iu inter ili estis arestita, la membroj de la bando au koruptis la ĵuĝantaron, au estiseble, au ĝin minacis per armiloj. Por doni ekzemplon: Jack Diamond, banditestro en New-York, estis arestita 35 fojojn, sed nur 2 fojojn kondamnita je nonpuno, kvankam li faris multajn mortigojn. Multege ni ankoraŭ povus skribi pri tio, sed mi ne volas iri en detaloj.

"The Prohibition", t.e. la kontraŭtrinkaĵa leĝo, voĉdonita la 1-an aŭguston 1917, anstataŭ kontraŭbatala, estis el la plej gravaj kaŭzoj unu kiu plej multe krimhelpis la formadon de la "gangster"-bandoj. Per voĉdono de tiu ĉi leĝo, oni malpermesis en la tuta Usono trinki klanajn trinkaĵojn, kiu entenas alkoholon. Pli antaŭe, oni ĉefe diferencigis la sekajn kaj malsekajn ŝtatetojn t.e. en la unuaj oni malpermesis, en la aliaj oni permesis la alkoholenhavantajn trinkaĵojn. Sed je instigo de la puritanaj akvotrinkuloj, la leĝo ĝeneraligis. La protestantoj tamen ne formis la plej grandan parton de la Usonanoj; estis ankaŭ Katolikoj kaj anoj de diversspecaj religioj. Tiuj ĉi ne akceptis la leĝon kaj daŭrigis trinki kion ili volis. La leĝo do ekzistis nur teorie, sed tamen estis leĝo: oni ne povis fabriki alkoholaĵojn publike (do faru tiam sekrete). Kaj sekrete estis grandegaj bier- kaj alkoholaĵfarejoj, tial ke Usono estis superŝtita per bieroj kaj likvoroj de

malbonega kvalito (ofte ili estis venenaj).

La leĝo do ege malhelpis amstataŭ helpi. Sed por la kandidatoj - pro la okazo ili iĝis "bootleggers" (I) (trinkajkontrabandistoj) - tiu periodo estis la ora tempo. Ili gajnis sumegojn da dolaroj. Siajn varojn ili vendis al trinkejoj, "bars", "speak-easies" (dumoktaj trinkejoj) k.a. Se iu ne volis aĉeti, tiam la rasinpafiloj estis konvinkigintaj argumentoj. Kion fari la polico? Preskaŭ nenion? Au ĝi estis koruptita, au ĝiaj estroj nun posedis trinkajfare egojn. De tempo al tempo oni arestis kelkajn personojn, kiuj nur estis etaj trinkajkontrabandistoj; nur tresege malofte okazis, ke grandaj sanĝoroj smee-liberŝejiĝis kaj plej ofte ili nur ricevis nonpunon, (guto en la nazo). Tiel ke la banditoj iĝis "big businessmen" (grandaj negocistoj). Kiu ne havis sufiĉe da trinkajfaregojn - pro manko da loko, ekzemple en la urbegoj - venigis alkoholaĵojn el la eksterlando, kaj tio fariĝis nare per grandaj ŝipoj (venio je iu momento tion da ŝipoj, ke oni nomis ilin la "phunamada").

En 1932 la leĝo estis nuligita kaj la fruktodona fielfico de la banditoj finiĝis. Kion fari? Dekmiloj da personoj, kiuj laboris en la trinkajfaregoj, transportadis la varojn, protektis la transportojn kontraŭ alibandaj atakoj, au fariis aliajn perantajn servojn, ne plu havis laboron. Estis kelkaj inter ili, kiuj trovis laboron en la nun publike ekstantaj trinkajfaregoj, sed la plejmulto, kutina je malhonoraj aferoj, ne havis tiun okazon. Ili do revenis al sia antaŭkontrabandistperioda fielfico: tiu de "safe-opener" (kiu ŝtelo malfermas brulrezistantajn monŝrankojn), de "pick-pocket" (poŝtelisto) ktp. Sed kelkaj ruzaj klopodis novajn gangster-sistemojn, speciale: la bankrabado, "kidnapping" (honrabo) kaj aŭtonobilŝtelo. La "gangsters" ne plu estis honoro, kiuj povas pridiskuti kun la juĝistoj, ne, ili sin fidis nur je la armiloj kaj teruris la amason. Iau kaptitaj, ili ne plu povis fari ion, kaj la plejmulto de ili kuraĝe (?) mortis sur la elektra seĝo. Post la glora kontrabandistperiodo, venas nun la tempo de la "public-enemy number 1" (publike malamiko n° 1).

(dabrigota - verkis: Martens Roger)

(I) Bootleggers: tiu vorto ne estas je unua vido kunmetita el "boot" (boto) kaj "leggen" (meti) -- oni ja ofte transportis alkoholaĵojn per botoj -- La etimologio de tiu vorto estas sekva: "boot" (en angla lingvo: boto), "legs" (angla: kruroj), ĉar la sekretaj trinkajfaregoj plejmulte kuŝis en urbarnaj kaj marĉaj regionoj, la trinkajkontrabandistoj por transporti la varojn trans la marĉoj uzis botojn, kiuj kovris la krurojn. (Al la tie fabrikitaj alkoholaĵoj oni donis la belan nomon "moonshine" (lunbrilo), ĉar oni fariis ilin dumnokte en la arbaraj trinkajfaregoj).

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

ANGULO DE LA SERĈEMULOJ :-

Statistiken.

Ik heb ne eens even beziggehouden met een nazicht en overzicht van het gepresteerde door de leden op gebied van "het hoekje der zoeklustiger". Ik kwal tot een verrassende doch spijtige vaststelling. Ik betwijfel dan ook of het nog verder de moeite zal loonen deze rubriek in ons nummer nog langer een plaats in te ruimen. Ziehier dus wat werd gekonstateerd:

Sinds ons maandelijks tijdschrift verscheen (voor het eerst in December 1947) plaatste ik in 22 nummers er van ten minste een - soms meerdere - enig no. De waren meestal zoo opgesteld dat ze een geheugenverfrissing waren voor de leden die zich de moeite wilden getroosten ze op te lossen (bv. in dien de volledige oplossing een "proverbo" zou doen kennen, dan was het een spreekwoord dat we reeds in de groep hadden gehoord, een spreekwoord dat we dus reeds "konden kennen". De verschillende woorden waren meestal niet deze van dagelijksch gebruik ou de leden toe te laten hun woordenschat te kunnen verrijken bij het verplicht nazoeken in een woordenboek. Het had immers geen zin van telkens met doorgewone woordjes te goochelen als "sinjoro" "tago" "scandeano" "idealo" "majstr" "ekskurso" e.d.g. al uitdrukkingen die welhaast ook de papegaaien in het huis van een beginner-esperantist zullen kunnen na- spren. Om kort te gaan: over al deze maanden kwamen er slechts 53 (ik zeg: drie en vijftig) inzendingen binnen t.d.z. amper een gemiddeld van iets meer dan 2 inzendingen per maand. Als men nu weet dat oorspronkelijk gedurende meer dan 12 maanden de revue op 60 exemplaren werd getrokken, later slechts op 50 en dat al deze nummers werden in handen gegeven van esperantisten (op een paar witte-marel-uitzonderingen na) dan kunt U zich een gedacht vormen het welk enthousiasme (?) de oplossingen werden gemaakt. Maandelijks waren er dus minstens een 45 leden die het verloren tijd vonden deze rubriek in te zien.

Altogether nu nog zeg dat mij de 5 eerste maanden 6 inzendingen gemiddeld toe kwamen van kunt U zelve de gevolgtrekking maken wat er nog overschoot van de gemiddelde inzendingen der volgende maanden.

Hieronder nu een lijst der tot heden verzamelde punten: I. Martens R. 126 (niet meer in sinds April 1943) - 2. Martens Gr. 103,5 (niet meer sinds December 1942 door vertrek naar Duitsland) - 3. Verlooye B. 67 (niet meer sinds Januari 1942 door verlaten der stad) - 4. Maly Denise 59,5 (sinds April 1942) 5. F. Roose 48,5 6. Alf. Worro 41 - 7. Geiratoj Callwaert 37,5 - 8. Maria Vjd. Broecke 34 - 9. De Kersgrieter Henriette 25 - 10. Sano Cort-vriendt 10 - II. Marie-Thérèse Roose 5,5 - 12. Rose-Anne Roose 5

De vier eersten der klasseering zonden sinds meer dan een jaar, zelfs 2 jaar niet meer in (waarvan 2 spijtig genoeg door geval van overmacht) en toch blijven zij steeds ongenaakbaar aan de kop der rangschikking. Valt er daar nog commentaar aan toegevoegd om de vermindering aan werkluist en leertijver te bewijzen? Wat mij ten slotte het meeste speet was dat ik geen enkele inzending ontving van drie der mooiste enigmojen naar de tekening. 't zij vooral voor de 2 laatste naar inhoud. Ik bedoel: I. de "pluvombrodenigmo" uit Julinummer '43, de "papilio-enigmo" uit Septembernummer '43 en het kruiswoordraadsel uit Maartnummer 1944 op bijblad dat uitsluitend uit "radikvortoj" was samengesteld. Om na te gaan of er nog een weinig belangstelling is voor deze rubriek heb ik dan ook besloten een premie te schenken per oplossing voor iedereen die me binnen de maand één der drie of alle drie de aangehaalde enigmojen zal insturen. Daar aan deze oplossingen werk genoeg is verschijnt in huidige nummer dus geen op te lossen enigmo. Ik hoop dat allen zich aan het werk zullen zetten om ten minste een premie te kunnen verdienen. Alle inzendingen te sturen aan de sekretaris der groep: Iserentant Roger.

88888888888888888888

NIA GRUPA VIVADO : - (Período de 18 Junio ĝis 19 Julio 1944)

Ŝajnas ke ju pli la tempcirkonstancoj plimalboniĝas, des pli tamen li ĵu-
do laborkunvenoj pliinteresiĝas. La atmosfero de tiuj kunvenoj ĝis tra-
granda kaŭzo de la nova aranĝo, kiun oni, laŭ estrara decido, tuj faras.

Kun eksterordinara akurateco la kunvenoj komenciĝis. Nia prezidanto ilin
ekkonencis per mallonga priesperantnovada parolado, en filozofa stilo kompre-
nebla, kaj al fino de ĝi ĉiam estis tiujn vortojn: "Gekamaradoj, ni esperas
ke vi estas en la ĝusta animstato por komenci tiun kunvenon."

La prilaborkunvenajn raportojn oni regule faras (kaj se oni bone pripensas
tio ne estas tiel malfacila, sed bona ekzerco por plikono de la lingvo).

La ekzamenoj finiĝis - la rezultatojn oni ne ankoraŭ sciigis - kaj lau nia
opinio ili estas, escepte de kelkaj punktoj, granda sukceso. Kiel distraĵo ni
solvis internetitan enigmon, faritan de la sekretario, kaj ni enkad. ekkonen-
cis la esperantlingvan rakontadon de spritaĵoj, anekdotoj, k.t.p. speciale
por sin ekzerco en la lingvo. Samideano Martens Roger unue rakontis kelkajn
anekdotojn pri la greka filozofo Diogenes; sekvis samideano Carlos Callwaert
kiu rakontis fun. ŝercon de Uilenspieghle.

Danandunatenaj kunvenoj regule sin sekvas. Ekskursoj al tereno de Ryckewel-
de daŭrigas, sed la malbona vetero ne volas ion ŝanĝigi.

La juna festvespero estis malsukceso - nur eta grupo da gensebroj kunve-
nas - sed tio estas ja komprenebla ĉar la polichoro momente estas je 10.30 h.

Plej grandan sukceson havas la estraro decido pri nura parolado de Espe-
ranto dum niaj kunvenoj. Juanito la gensebroj akceptis ĝin kaj ili tuj ko-
nencis tiun ĝi iniciativon. Oni feliĉe povas konstati ke, dum la grupvesperoj
oni preskaŭ ne plu aŭdas nederlandan lingvon.

Ki fine volas altiri la atenton al jena fakto: la prezidanto donas premiojn
al tiuj gensebroj kiuj plej multe legis esperantajn librojn. Do, karaj gese-
brupanoj, malplenigu la grupan bibliotekon.

(la prizorganto: Martens Roger)

%%%%

KIU ONI ĜIN ESPRILAS EN ESPERANTO ? -

- Se forrestas la suno, sufiĉas la luno - (Men moet roeien met de riemen die men heeft)
 - Vi venas kvazaŭ vokita kaj petita - (Gij komt als geroepen)
 - Akvo kura, akvo pura
 - Labore fortigas, ripozo putrigas
 - 36 ŝtono verdiĝas, se ĝi longe ne moviĝas
- (Rust, roest)